INSTRUISTA

Numero
25

1958.07.25.

# Letero

Redakcio kaj administracio: Oskar Svantesson, Skonertgatan 1,
Göteborg Vr. Svedujo. Poŝtĝiro 6 22 52. Telefono: 29 03 81.

Aldonoj al la jarraporto 1957 - 1958.

ITALUJO. Membraro 108 (el kiuj 54 estas profesoroj en mezgradaj lernejoj, 38 instruistoj en mmxgx elementaj lernejoj, 16 estas neinstruistoj, pensiuloj ktp). La Sekcio etendiĝas en 13 provincoj. Oni estas plej multnombra en Bologna, Catania, Milano. Oni celas enkondukon de Esperanto kiel oficialan disciplinon, sed por iniciate grandstile necesas almenaŭ du centoj da enskribitoj. La Sekcio faras paŝojn instigi al fakdelegiteco de UEA.

SVISLANDO. Esperanto-Edukistaro de Svislando fondiĝis en 9-II-1958, kun 13 anojLa Societo komencas labori en aŭtuno. S-ro M. Erbetta administras "Grajnoj en Vento"-n. D-ro Perrenoud praktikas la instruadon de Esperanto per "Ora Metodo".

URUGVAJO. En la programo de la Unua Jaro de Studoj de la Normalaj Institutoj en Urugvajo (19) estas enskribita la temo: - Nocioj pri Esperanto kiel Universala Lingvo. Pluraj Institutoj jam kvitancis danke la informojn efikajn senditajn de Urugvaja Esperanto-Societo. La ŝtata liceo de Colonia permesas kurson de Esperanto, kaj la Instituto de Superaj Studojen Montevideo akceptis starigon de lektorato en Esperanto en la kadro de 18 kursaro por 1958. D-ro E. Pfeffer okupas la koncernan katedron. La akcepto de rezolucio pri Esperanto kiel familia lingvo inter blinduloj ĉe la 3-a Amerika Kongreso de Blinduloj (marto 1958) jam estas plene raportita de "Instruista Letero".

KOREO. 80 gestudentoj kaj gimnaziaj gelernantoj studas Esperanton en 13 edukejoj (aĝoj 15-24) universitatoj, kolegioj, gimnazioj. Ili estas komencantoj kaj mankas al ili lerno- kaj legolibroj. La adreso por ĉiuj estas: Taekeng Kim, prezidanto de Korea Studenta Esperanto-Federacio, 41-10, 21 Ban I-Ka, Sam Deok-dong, Taegu.

FINNLANDO. Ĵus venis grava novaĵo. La 3-an de julio S-ro Vilkki, rektoro de la liceo en Somero, ricevis la aprobon de la ĉefurba lerneja administracio por nova kvinjara studplano. La projekto enhavas multajn instruajn kaj edukajn ideojn proponitajn de S-ro Vilkki. Inter ili estas la propono, instrui Esperanton al Sekcio C. de la unuajaruloj, aĝo 11-12. Sekcio A. havos en la unua jaro la svedan kaj poste la angun ĝis la fino de la liceo. Sekcio B. komencas per la germana kaj sveda sekvas ekde la tria jaro. Sekcio C. komencas per Esperanto po 6 lecionoj semajne.En la dua jaro venos la germana kaj en la a sveda.

r...
Esp...
membr...

Post unu jaro da instruado en Esperanto ĉe Sekcio C. S-ro Vilkki intencas instrui iun fakon, prefere la geografion, en Esperanto. Li havas tri celojn: 1) montri, ke dum unu jaro geknaboj akiras kontentiga lerton en la lingvo kaj parole, kaj skribe, 2) uzi Esperanton kiel bazon por aliaj fremdaj lingvoj, 3) utiligi Esperanton kiel ka instruilon por alia fako.

Korajn gratulojn kaj bondezirojn. Pli da detaloj sekvos.

<u>Financa situacio de ILEI. Jaro 1957-58.</u>

| | p | ŝ | p |
|---|---|---|---|
| ENSPEZOJ. | | | |
| Kreditsaldo 1957-58 | 1 | 12 | 11 |
| Kotizoj antaŭpagitaj por 1957-58 de Aŭstralio, Aŭstrujo, Germanujo, Prof. F. Menendez | 2 | 0 | 8 |
| En la kaso 30-6-57 | 3 | 13 | 7 |
| Kotizoj 1957-58: Britujo 1-2-0, Italujo 1-0-0, Francujo 3-0-0, Nederlando 5-6, Svedujo 1-0-0 | 6 | 7 | 6 |
| Donacoj: Bepperling 2-0-o, Sennomulo 3-0-0, Bonge 2-4 | 5 | 2 | 4 |
| Kotizo pagita por Bulgarujo (Donace) | | 6 | 0 |
| Internaciaj kuponoj | | 1 | 6 |
| Kontanta mono | | 4 | 7 |
| | 12 | 1 | 11 |
| ELSPEZOJ. | | | |
| Afrankado (8-7-58) | 5 | 2 | 10 |
| Papero ktp | | 7 | 3 |
| Kotizo UEA 1958 | 1 | 0 | 0 |
| | 6 | 10 | 1 |

NB. 289 komunikaĵoj - leteroj, poŝtkartoj, pakaĵoj - senditaj.

La kosto de afrankado alilanda plialtiĝis en Britujo. Restas, 3-VII-1958 ĉe ILEI 9-5-5 pundoj (el kio 6 ŝ estas tenataj por Bulgarujo). El tiu supra sumo ni ŝuldas la koston de la presado de nia Konstitucio kaj Deklaro pri Homrajtoj. Ni ankaŭ el ĝi antaŭpagas nian kotizon al UEA.

V. C. Nixon.

<u>Redaktaj notoj.</u>

Pri la antaŭenpaŝo en Finnlando IL ricevis fruan informon de S-ro Malmgren. Tiu informo estas iom pli ampleksa ol tiu de F-ino Nixon, sed donas ĉefe la saman informon. Ni dankas al S-ro Malmgren. --- Estus bone, se ni poste sukcesos publikigi pli ampleksan raporton pri la sukceso.

Pro tempomanko ni devas fari ĉi tiun IL-on maldika. Ni esperas
ra aperigi novan numeron ĉ. la 20-a de aŭgusto kun la unuaj informoj
Espe nz.
membra iu numero estas aldonita kopio de la Konstitucio por ILEI.
. de ĉi tiu nùmero ni ekspedos rekte al Mainz.

Konstitucio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

1) La nomo de la internacia instruista organizaĵo estu: INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ.

2) La celoj de la LIGO estu:
1. Kunlaborado inter geinstruistoj por enkonduki Esperanton en lernejojn ĉiuspecajn,
2. Kunlaborado inter geinstruistoj por ebligi la praktikon de Esperanto inter gelernejanoj kaj geinstruistoj per korespondado kaj vizitoj,
3. Kunlaborado inter geinstruistoj per Esperanto rilate ĉiujn pedagogiajn aferojn.

3) La LIGO estu bazita je landaj asocioj (aŭ sekcioj) de Esperantistaj geinstruistoj, kiuj havu siajn proprajn regularojn, kaj kiuj funkcias pere de jara kunveno de la anoj, al kiuj la estraro de ili elektita estas respondeca.

4) La LIGO estu gvidata de KOMITATO, konsistanta el po unu reprezentanto de ĉiu membra asocio (sekcio) elektita alcele de la membra asocio, aŭ dum la jara kunveno aŭ laŭ la bontrovo de la anoj de la membra asocio. Ĉi tiuj reprezentantoj havas la devon prezenti la opiniojn de siaj asocioj kaj raporti al siaj anoj la farojn de la KOMITATO de la LIGO. Ili ankaŭ havas la devon informiĝi pri la situacio en siaj landoj rilate Esperanton en la lerneja kaj eduka mondo kaj raporti tion al la Sekretario de la LIGO. La komitato kunvenu almenaŭ unu-fojon jare por gvidi la ĝeneralajn aferojn de la LIGO.

5) La KOMITATO elektu el siaj membroj estraron, konsistantan el Prezidanto, Sekretario-kasisto, kaj 3 konsilantoj.

La Prezidanto kaj konsilantoj estu elektitaj por trijara periodo kaj estu tiam reelekteblaj. La Sekretario-kasisto estu elektita sen limdato, sed estu aprobita de la KOMITATO ĉiujare.

La Prezidanto devas prezidi la komitatan kunvenon kaj aliajn kunvenojn de la LIGO laŭeble. La Sekretario-kasisto devas esti la protokolisto de la Komitata kunveno kaj efektivigi la decidojn de la komitato; gvidi Centran Informejon per kiu li ricevu kaj konservu informojn por kaj pri la LIGO; fari la necesan agadon rilate la registron de membraj asocioj kun iliaj reprezentantoj, interkonsiliĝi kun la Prezidanto kaj la 3 konsilantoj pri aferoj de la LIGO eksterrutinaj.

La Konsilantoj estas respondecaj kun la Prezidanto kaj la Sekretario pri la agado de la Ligo inter la jaraj kunvenoj de la komit ato kaj devas havi informojn pri tiaj aferoj por ke ili konsilu kaj aprobu. Se iu afero urĝas, tiam la Sekretario interkonsiliĝu nur kun la Prezidanto, sed informu la Konsilantojn poste.

6) En landoj, kie ne ekzistas instruista asocio (sekcio), la Estraro aprobu reprezentanton de la Ligo, kies devo estas informiĝi pri la situacio rilate Esperanton en la lernejoj kaj edukaj rondoj, raporti pri tio al la Sekretario de la Ligo, kunlig geinstruistojn Esperantistajn kaj laŭeble formi instruistan asocion, kiu fariĝu membra asocio (sekcio) de la Ligo.

Ĉiu izola instruist(in)o estu kunlaboranto en la Ligo se li (ŝi) ~~xix~~ registras sin ĉe la Centra Oficejo. La Sekretario de la Ligo laŭeble informu tiajn geinstruistojn pri aliaj gekolegoj en la sama lando.

7) INFORMILO. La oficiala informilo de la Ligo estas "Instruista Letero", eldonata laŭ serioj de dek numeroj. Estas necese, ke ĉiu oficisto, komitatano kaj reprezentanto de la Ligo abonu ĝin.
En landoj, kie ne estas membra asocio de ILEI, individuoj povas iĝi membroj de ILEI per abonado de "Instruista Letero".

8) FINANCA BAZO. Ĉiu membra asocio (sekcio) subtenu la Ligon, ĉu per procentaĵo de la tuta enspezo, ĉu per malgranda pago laŭ membro. La minimuma jara pago estu 6 anglaj ŝilingoj.

9) La LIGO estu kunlaboranta asocio kun UEA kaj estu preta akcepti kunlaboron kun ĉiuj aliaj internaciaj organizaĵoj.